

MAZINGIRA  
P.O KESTO 51, BUNDA. TANZANIO

Retadreso: [smbmramba@yahoo.com](mailto:smbmramba@yahoo.com)

[www.kono.be/mazingira](http://www.kono.be/mazingira)  
[www.verdulog.org/mazingira.htm](http://www.verdulog.org/mazingira.htm)



La 23-a de Septembro 2015

Karaj Estimataj subtenantoj de Mazingira.

Kun granda ghojo mi sendas al vi chi tiun raporton pri la laboroj faritaj de Mazingira dum la periodo de Oktobro 2014 ghis Septembro 2015,

Por chi tiu jaro en Tanzanio la plej gravaj informoj estas pri la chefa balot-kampanjo kiu okazos la 25an de Oktobro 2015 en kiu oni balotos por elekti la prezidanton de la lando, la parlamentanoj kaj la konsilioj kiuj gvidos la landon ghis 2020.

Mi jam gvidis la vilagharon Salama ekde 2005 ghis 2010 kaj denove oni elektis min por gvidi la vilagharon Ketare ekde 2010 ghis Oktobro 2015 kaj mi denove kandidatas por esti elektonta por gvidi la vilagharon Ketare kiu kunighas 4 vilaghoj kiuj entute havas kvanton de chirkau 10,000 loghantoj. En tiu baloto mi reprezentas mian politikan partion nomita "Chama Cha Mapinduzi" mallonge (CCM) (revolucio partio). Ghi regis ekde la sendependeco de nia lando kontrau Britoj en la jaro 1961.

Antaue la nomo de tiu partio estis "Tanganyika African National Union" (TANU) ekde la jaro 1954 ghis 1977 kiam la nomo de la partio shanghighis al CCM. Tiu partio estis la sola politika partio kiu regis la landon kaj ne estis opoziciaj partioj ghis la jaro 1992 kiam la registaro permesis la ekziston de opoziciaj partioj kaj ghis nun ekzistas 22 politikaj partioj. La unua baloto kiu kunighis la opoziciajn politikajn partiojn okazis en 1995, 2000, 2005, 2010 kaj denove okazos en la 25a de Oktobro 2015; sed chiam CCM venkis, kaj tio povus okazi akau por la venonta baloto en Oktobro 2015.

#### RAPORTO PRI LA AGADO DE MAZINGIRA EN 2015:

Mi kore dankas al chiuj kiuj subtenis la projektojn de Mazingira dum la jaro 2015, kaj mi esperas ke via subteno al la projektoj pli dauros ankau por la jaro 2016:

#### SANO :

Ketare vilagharo havas 2 dispensariojn kiuj servas al preskau 2000 malsanuloj monate. Inter ili estas ankau infanoj kaj gravedulinoj. Chiam mankas bona sano-servo al la loghantoj, pro tio multaj homoj suferas pro manko da medikamentoj kiuj ege multe kostas al ne pagi-povaj familioj; pro tio multaj malrichuloj kiuj ne povas acheti medikamentojn che privataj apotekoj; kaj tial devus iri al tradiciaj kuracistoj kiuj ne kapablas kuraci gravajn malsanojn per iliaj tradiciaj medicinoj.

En Ketare vilagharo trovighas preskau 420 familioj kiuj enhavas chirkau 2528 personojn kiuj estas malrichaj, kaj bezonas subtenon de chirkau 4200 Eurojn jare por ricevi bonan kuracadon. La plej gravaj malsanoj en Ketare vilagharo estas: Malario, Aidoso, Diareo, Pneumonioj, Tuberkoluso kaj Kholero.

La registaro de Tanzanio jam anoncis ke la san-servo en la shtataj kuracejoj estas senpage, sed tio tute ne sukcesis char mankas medikamentoj che la shtataj kuracejoj kaj pro tio malsanuloj devus mem pagi por medikamentoj kiuj ege multekostas por malrichuloj.

Ekzistas shtata san-asekuro CHF kiu kostas 10 Euroj por unu familio de 6 personoj dum unu jaro sed pro la malricheco multaj familioj ne povas alighi al tio asekuro. Pro tio Mazingira decidis kolekti monon che subtenantoj por almenau unu familio per 10 Euroj, kiu ebligas 6 personojn alighi al tiu asekuro kaj ricevi bonan kuracadon dum unu jaro. Jam ch. 75 familioj ricevis tiun helpon dum la jaro 2014/15 - do mi dankas al chiuj kiuj subtenis tiun projekton kaj ancorau petas al aliaj, bonvolu subteni almenau unu familion per via donaco de 10 Euroj por la jaro 2016.

#### RADIO PROJEKTO:

UNDP, UN Evoluiga Programo, subtenis nian radiostacion "Mazingira Fm" en la jaro 2015 .

Nia radio elsendas programojn kiuj ne nur temas pri auskultado de muziko, sed ili ankau multe

parolas pri konservado de medio, homaj rajtoj kaj pri chesigo de malbonaj tradiciaj pensoj de diversaj triboj en nia regiono, kiuj estis kontraŭ la rajtoj de virinoj - ĉar kelkaj triboj pensis ke virinoj valoras nenion kaj malhavas rajton heredi kaj posedi terenon, aliri al edukadon, viziti malsanulejon dum la gravedeco, kaj ke virinoj valoras kvazaŭ venditaj varoj. Ni informas kontraŭ la mortigado de albinoj (blank-hautaj nigruloj), kontraŭ vira perforto kaj varbas por la chesigo de ina cirkumcido (mutilacio).

#### AGRIKULTURO:

La agrikultura projekto de Mazingira en ĉi tiu jaro iom bone progresis, en 2015 ni aĉetis 105 tunojn da sunfloro-semoj de lokaj agrikulturistoj kiujn ni muelis kaj elpresis kaj produktis 2800 litrojn da kuir-oleo, kiun ni vendis kaj ricevis bonan profiton de ĉirkaŭ 9000 Euroj. La monon ni elspezis/as parte por subteni la konstruadon de nova baza lernejo kaj parte por subteni la kuracadon de infanoj kaj virinoj kiujn ne povis pagi por la kuracadoj.

#### OPERACIO DE INFANOJ KUN MISFORMITAJ PIEDOJ:

Dankon al Manfred Westermayer, Christiane Lamy kaj Ute Haas kiuj subtenis la operaciojn de infanoj kun misformitaj piedoj (pro kuracado de Malario pere de kinino).

Tamen restas pliaj infanoj kiuj ankoraŭ atendas la subtenon por operacii iliajn piedojn.

MIKROKREDITOJ: Dank al tiu projekto multaj virinoj vere profitis/as pruntepreni monon por starigi/daŭrigi siajn malgrandajn projektojn pri agrikultivado kaj bredado da kokinoj kaj bestoj.

AKVO & PUTO-PROJEKTO: Ni tre tre dankas al la Franca Asocio Solidareco Afriko-Azio kiu subtenis la projekton konstrui pliajn 7 putojn kaj 1 akvo-rezervujon, kiu kolektas akvon de la tegmento; kaj ni petas daŭrigi la subtenon por pliaj akvo-rezervujojn je dispensarioj kaj ĉe bazaj lernejoj. Unu rezervujo kostas 2000 Euroj. Krome ni petas subteni la konstruon de la unua baseno por kolekti pluv-akvon, kiu kostas ĉirkaŭ 7000 Euroj.

ARBARIGO: En tiu jaro ni semis 2000, el kiuj bone kreskis 1200 arbidoj kiujn ni daŭre disdonis al lernejoj kaj al kelkaj familioj kiuj interesighis pri arboj. En 2016 ni semos 1000 arbidojn

#### ORFO-PROJEKTO:

Dank al tiu projekto multaj lernantoj povis trapasi la ekzamenon de la baza lernejo por pli-studi en meza lernejo. Mi esperas ke pli multe da lernantoj sukcesos ankaŭ en 2015.

En 2015 ĉirkaŭ 392 orfoj ricevis helpon de Mazingira; inter ili ĉ. 327 ricevis helpon el Francio kaj ĉirkaŭ 65 orfoj ricevis helpon el Belgio, Germanio kaj Nederlando. Mi kore petas vin: daŭrigu vian helpon denove por la jaro 2016.

#### LERNEJO PROJEKTO:

Konstruado de Esperanto mez-lernejo daŭris ankaŭ en 2015, dankon al ĉiuj kiuj subtenis la projekton. Ĝis nun estas finkonstruitaj 6 klasĉambroj, kiuj sufiĉas por ĉirkaŭ 240 lernantoj; sed ankoraŭ estas bezonataj pliaj 6 klasĉambroj. Ni finkonstruis la administrejon kaj 2 loghejojn por instruistoj; ni bezonas ankoraŭ pliajn 14 loghejojn, ĉar la lernejo nun havas entute 13 instruistojn, kaj daŭras la konstruado de laboratorioj por biologio, kemio kaj fiziko. Mi elkore petas vin daŭrigi vian subtenon por tiu projekto ankaŭ por la jaro 2016. Mi instruas Esperanton en tiu lernejo, sed mankas mono por konstrui bibliotekon - ankaŭ por la Esperanto-libroj. La biblioteko kostas ĉirkaŭ 6000 Eurojn.

ESPERANTO-KURSO : Ni dankas la daŭran subtenon flanke de la fonduso "Esperanto-plus" kiu subtenis/as la instruadon de Esperanto al lernantoj en la mezlernejo "Esperanto Secondary School" dum tiu jaro. Multaj lernantoj partoprenis la lernadon de Esperanto kaj bone lernis la lingvon. Dum la jaro okazis speciala kurso kiu celis plibonigi la lingvo-nivelon de lernantoj en kiu partoprenis ĉirkaŭ 150 lernantoj kaj instruistoj; plia kurso okazos en Oktobro 2015.

#### **Koran dankon al ĉiuj subtenantoj: Mramba Simba Nyamkinda**

Subteni eblas al la UEA-konto de la Flandra Esperanto-Ligo: fela-x  
au al la bank-konto de FEL: IBAN: BE66 0000 2653 3843 BIC: BPOTBEB1  
ne forgesu rimarki: "Mazingira, projekto, kaj eble vian nomon"